



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

Kio estas Bervalio?

Legu pri tio en

BERVALA KURIERO

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 8/77 - 24 feb 1977
Aperas ĉiusemajne

75 jaroj da organizita Esperanto-vivo en Aŭstrio

Vieno (pp) - Por la Aŭstria Esperantista Federacio la 3-a de marto 1977 estas jubilea dato. Ĉar en tiu tago kompletigas la 75-a jaro de ĝia seninterrompa organiza tradicio. Ni akcentu la vorton "seninterrompa", ĉar ankaŭ dum la sep jaroj de persekuto, nome inter 1938 kaj 1945, la oficiale, per forto, likvidita movado de la aŭstraj esperantistoj estis nur supraĵe, nur ŝajne morta. La membroj, kiuj aktivis antaŭe, plufirmtenis sian idealon kaj eĉ plukunvenadis, kvankam sekrete kaj je granda persona risko. Kaj kiam nia patrio regajnis sian liberecon, tiuj samaj idealistoj rekonstruis la familieran, nun denove laŭleĝan aŭstran Esperanto-organizon.

Tio okazis en la jaro 1945. Certe, jam tiam la plejmultaj el la Esperantanoj, kiuj estis unuigintaj pli ol kvardek jarojn antaŭe, en la jaro 1902, ne plu vivis - inter ili la fondinto mem. Kiu estis tiu fondinto?

Laŭ tradicio, nun preskaŭ ĝenerale fidata kaj ankaŭ en la "Enciklopedio de Esperanto" kaj aliaj presaĵoj prezentita, la certe meritplena pioniro Josef Schröder, baldaŭ helpate de dua eminentulo, nome de profesoro Otto Simon, ankaŭ establis la unuan vianan Esperanto-organizon, la "Unuan Vianan Esperanto-Klubon".

Tamen tiu tradicio eraras. Kredeble ne pro partieca prisilentemo, sed simple pro forgeso. Schröder nur reformis kaj vigligis, en jaro 1904, la vivon de la jam ekzistanta klubo. Fondita ĝi estis jam du jarojn pli frue, la 3-an de marto 1902, de noblanima, idealista viro, kies nomo estis Theodor Helf.

Li estis ankaŭ la unua prezidanto de la klubo, dum kvar jaroj, do eĉ kiam Schröder, lia posteulo, jam estis aliĝinta. Sed pro pli kaj pli malboniĝanta sanstato Theodor Helf fine retiris sin tute de ĉiu aktivado. Tamen li partoprenis la unuan aŭstran Esperanto-kongreson en 1910. Ni vidas lin en la kongresa foto publikigita en la gazeto "Österreichs Ill. Zeitung". Tuj apud li staras lia tiam dekjara filo Othmar, inter la multaj homoj, kies vizaĝojn la bildo montras, verŝajne la sola, kiu ankoraŭ vivas kaj tiun kongreson memoras. Al li, aŭtoro de subtilsenta poezio, ni dankas la ĵus menciitan indikon kaj aliajn valorajn sciigojn pri lia patro kiu mortis jam 5 jarojn poste, en majo 1915. Ne plu aperadis tiam, pro la milito, la periodaĵo de la aŭstria Esperanto-organizo, do ne eblis publikigo de nekrologo. Kaj tio kontribuis probable al la forgeso pri liaj persono kaj senduba merito.

Dr. Karl Beckmann, Wien

Nota: La supra artikolo estos disaŭdigita la 3-an de marto, en la 5-minuta Esperanto-elsendo de ORF Regional, je la 18,50 horo sur ultra-kurtondo kaj meza ondo 203,4 m!

Pilo-Press, ĉiusemajna informservo, jara abono 30,- GM

Bonvolu pagi al Ludwig Pickel, D-8500 Nürnberg, Poŝtĉekonto Nürnberg 819 56-851; Stadtparkasse Nürnberg 1.901.579
Aperas ankaŭ 2-foje en la monato germanlingva eldono sub la nomo "Esperanto-Nachrichten-Dienst", jara abono 15,- GM.

Bondeziroj de Federacia Prezidento d-ro Rudolf Kirchschräger

Vieno (pp) - Laŭ Aŭstria Esperanto-Revuo, 1-3/1977, Aŭstria Esperantista Federacio ricevis, persone adresitan al s-ro Mudrak, leteron de la 13-a de januaro kun jena afabla teksto (tradukita):

"Tre estimata sinjoro estro! Mi dankas pro la al mi adresitaj afablaj bondeziroj por la Nova Jaro, kiujn mi recipokas kun miaj sinceraj deziroj por feliĉo al la aŭstria esperantistaro kaj por vi persone.

El via letero mi povis konkludi, kiel multvaria kaj engaĝita estis la agado de la aŭstria esperantistoj en la pasinta jaro. Min tre interesis ankaŭ la tradukaĵo de la Kristnaska Kanto "Paca Nokt", Sankta Nokt" en Esperanto.

Por la progresigo de viaj idealaj celadoj mi deziras al la aŭstria esperantistoj multajn pluajn sukcesojn!

Kun miaj plej bonaj salutoj
via d-ro Kirchschräger."

Dua Oficiala Bulteno de la 62-a UK

Rotterdam (pp) - Aperis nun la 40-paĝa ilustrita Dua Oficiala Bulteno por la 62-a Universala Kongreso de Esperanto en Rejkjaviko. La Bulteno enhavas ĉiujn gravajn informojn por kongresanoj pri Loĝigo, Ekskursoj, Postkongresaj Ekskursoj ktp. Pere de la kongreso ĉi-jare oni povas ankaŭ mendi la flugon al Islando. Kongresanoj povas elekti ekiron de jenaj flughavenoj: Düsseldorf (690 gld.); Frankfurt/M (750 gld.); Glasgow (330 gld.); Kopenhago (570 gld.); London Heathrow (375 gld.); Luksemburgo (540 gld.); Nov-Jorko (1150 gld); Oslo (555 gld.); Stockholm (660 gld.). La nombro en krampoj montras la flugprezon por al- kaj reflugo.

Esperanto-Jubileo en Gdansko

Gdansko (pp) - La Esperantista medio en Gdansko kaj ĝia regiono de multaj jardekoj tenas avangardan pozicion en la pola Esperanto-movado. Atestas pri tio la jubileoj, kiujn la gdanska esperantistaro festos de la 29-a de majo ĝis la 1-a de junio ĉi-jare.

Ili estas:

50-a datreveno de UEA-Kongreso en Gdansko, 1927

70-a datreveno de la fondo de la Unua Esperanto-Socio, 1907

90-a datreveno de la ekzisto de Esperanto.

Por omaĝi ĉi tiujn datrevenojn la Estraro de la loka filio de Pola Esperanto-Asocio organizos jubileaĵajn festojn kun tre interesa programo.

La solenaĵojn komencos solena inaŭguro en la Burĝa Salonego de la Malnova Urbedomo en Gdansko la 29-ande majo. Krome okazos i.a. renkontiĝoj kun lokaj Esperanto-veteranoj kaj partoprenintoj de la Kongreso de UEA en Gdansko, solenaĵoj ĉe la Kverko de Paco plantita dum la Kongreso, ekskursoj, art-vesperoj, balo kaj aliaj atrakcioj.

Ĉiuj esperantistoj estas invititaj al tiuj Gdanskaj Jubileoj. Detalajn informojn donas: Vojevodia Filio de Pola Esperanto-Asocio, poŝtkesto 222, PL-80-206 Gdansk, Pollando.

Praktiku Esperanton!

Aŭskultu la Esperanto-elsendojn!

Skribu al la Esperanto-Redakcio!

Reagoj - opinioj

Unue akceptu mian gratulon pro la senhalta, persista eldonado de Pilo-Press, kiu delonge fariĝis en nia movado institucio nemalhavebla. Dankon ankaŭ pro tio, ke vi daŭre sendas ĝin al kelkaj jurnalistoj. Ili bone uzas la materialojn, pri kio vi scias....

A. Pettyn, Milanówek

Krom tre atentindan alvokon de profesoro d-ro Helmar Frank "Pilo-Press", n-ro 6, prezentas, kiel ĉiam, interesajn kaj eĉ gravajn informojn, kaj trovis spacon ankaŭ por statistiko pri la Esperanto-korespondadoj ricevitaj de nia redakcio dum januaro. Koran dankon, s-ro Pickel!

El leterkesto de 1977-02-12/13 ORF Wien

Koran dankon pro interesiĝo en via informservo pri Esperanto en la Vatikana Radio. Laudetur Jesus Christus

Radio Vaticana, Esperanto Redakcio

Hodiaŭ mi legis en Pilo-Press 77 n-ro 6, ke elvenos de eldonejo Bleicher la unua traduko de Till Eulenspiegel en Esperanto. Tiu sciigo miris min, ĉar jam de 67 estas la verŝajne unua de tiuj verkoj sub numero 894 inter miaj esperantolibroj. Ĝia preciza titolo estas: Ulenspiegel tio estas Strigspegulo, tradukita de P. Wolrug, eldonita de Wouter F. Pilger Vulpo Amsterdam (kun ilustraĵoj laŭ la antverpena eldono de ĉ. 1500). La anoncita eldono do ne estas la unua, sed la unua pli ampleksa eldono de tiu fama verko; ĉar la libreto de Wolrug havas nur 16 paĝojn kun 8 lignogravuraĵoj.

Walter v. Waldowski, Berlin

Ĉu ni bezonas Radio-Revuon?

Ĉiam kun granda scivolo mi legas viajn informojn kaj spertojn pri la aŭskultado al diversaj radiostacioj. Ĉiam pli ofte profundigas en mi la konvinko, ke eble estus interese provi kaj transformi la Eŭropan Esperanto-Revuon, laŭkaraktere kaj laŭ enhave, en la revuon de radio-aŭskultantoj. Per tio vi povus varbi pli da abonantoj inter la aŭskultantoj! La efiko estus certe pli vasta kaj utilo por la radiostacioj aŭdigantaj siajn programojn ankaŭ en Esperanto...

Internacia Radio-Revuo aŭ Eŭropa Radio-Revuo povus plivigliĝi la diverslandan aŭskultantaron, aperigi plej interesajn tekstojn el la elsendoj pri ekz. movadaĵoj kaj radio-temoj, aperigi leterojn kaj spertojn de aŭskultantoj, konsilojn pri anten-konstruado, utiligo de la elsendoj dum kursoj kaj por informado ktp. ktp. Interŝanĝi vidpunktojn pri radia lingvouzo ktp. La movado rajtas ne malhavi tian revuon, kiun nur vi povas disponigi nunmomente! Mi mem estus preta kunlabori konstante.

Krome radiostacioj povus aperigi pagitajn reklamojn pri elsendohoroj kaj konkursoj, grandaj firmaoj estus tentitaj doni siajn anoncojn kredante, ke Internacia Radio-Revuo havas vastan atingosferon kaj valoras doni en ĝi anoncojn ktp.ktp. Pensu pri tio! IRR estas io, kion ni ne malhavi. Mi firme kredas, ke ĉiuj radiostacioj subtenos la iniciaton kaj reklamos ĝin konstante kaj senpage vidante en ĝi sian propran intereson.

Cetere, demandu pri tio la legantaron de "Pilo-Press" kaj de aliaj Esperanto-revuoj.

Andrzej Pettyn, Milanówek

Aktualaĵoj - mallonge

Esperanto-grupo Bremen: La 9-an de marto Kurt Petersen babile raportos pri "Kiel stenografisto de radio-stacio". Tempo 20,15 horo Loko: Kantino de Bw Bremen Hbf. - La grupo regule eldonas interesan, varian kaj allogan bultenon sub la prizorgo de Heinz Dieter Hartig.

Koblenz: La 16-an de februaro en Koblenz, Popola Altlernejo, parolis Hansjörg Kindler, nomata Trixini, Paströ en Luksemburgo, pri Esperanto. Dr. J. Kondor skribas pri la prelego: La prelego estis brila! P. Kindler estas vera majstro! Li estas simple magia!! Tiajn homojn ni bezonas! Li estas konvinkita pri sia pravo kaj batalas pro tio!

Dr. J. Kondor estas konvinkita, ke sekve de tiu prelego li povos komenci Esperanto-kurson aŭtune en la popolaltlernejo de Koblenz!

Pri ĝemeliĝoj

Ĉu estas esperantistoj en Nidda, Gross Umstadt, Lich - Giessen, Straubing, Fellbach, Biberach, Gross Biberach?

Tiuj lokoj ĝemeliĝis kun francaj urbetoj. Esperantistoj el tiuj francaj lokoj serĉas kontakton kun esperantistoj en tiuj germanaj lokoj.

Kiu scias pri esperantistoj en la supre menciitaj germanaj lokoj?

Skribu al S-ino Elfriede Kruse, ĝenerala sekretariino de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, Wiener Str. 121, D-6000 Frankfurt/M, telefono: 0611/657365.

Bietigheim: Hermann Heiss, vicprezidanto de GEA, Oberkirch, parolis antaŭ nelonge je invito de filatelista klubo de Bietigheim pri la temo "Esperanto el la vidpunkto de filatelistoj". Badische Neueste Nachrichten, Karlsruhe-Rastatt, en sia eldono de la 4-a de februaro tre pozitive kaj interese raportis pri la prelego.

Esperanto en Radio

Varsovio: Pola Radio okaze de la Semajno de Internacia Amikeco en la pasinta Esperanto-Ekspreso salutis speciale ĉiujn aŭskultantojn, la kolegojn de la aliaj Esperanto-elsendoj kaj la redaktorojn de la Esperanto-revuoj. Jerzy Grum kiel aŭtoro de la Ekspreso salutis ĉiujn Esperantistojn en Belgio, GDR kaj F R Germanio, kiu ĉeestis liajn prelegojn en tiuj landoj. Krome oni citis el la speciala eldono de Pilo-Press okaze de la SIA-semajno. - Interesaj estis la citaĵoj el la elpaŝoj de d-ro Carlo Minnaja kaj d-ro Detlev Blanke okaze de la Atena Podia Diskutado pri la temo "Kiel moderne argumenti por Esperanto". Mallonge oni povas diri, ke Minnaja pledis por "Esperanto por la amasoj" kaj Blanke por "Esperanto por ĉiuj medioj". La 22-an de februaro B. Pietrzak disaŭdigis novan eldonon de la rubriko el la "Esperanta gazetaro". - Cetere, nun la aŭskultebleco de la posttagmeza elsendo pliboniĝas.

Vieno. Feliĉe nun ankaŭ la aŭskultebleco de la mallongondaj elsendoj de Vieno fariĝas pli bona, denove. La ĵaŭda programo sur meza ondo je la 18,50 horo estas en Nürnberg bone aŭdebla.

Radio Vatikana denove estis bonege kaptebla kaj aŭdebla; vere bonega varia programo!

IBRA-Radio same estis denove en la etero. Erik Carlén ĉi-foje parolis pri timo antaŭ la morto!

Zagreb dediĉis sian duan program-parton al karnavala temo en pra-tempo!